

Prioritatoj en 2019: por kio Eŭropaj Verduloj batalas



European
Greens

Karaj voĉdonantoj, nun estas la tempo por:
alfronti la klimatsanĝiĝon; protekti demokration;
kontraŭ malamon kaj rasismon, batali por sociala justeco;
ŝanĝo en Eŭropo cele ebligi la plenumon de la revoj de ĝiaj civitanoj.

Nia verdula koncepto de Eŭropo estas tiu de Eŭropo:

kiu kampanjas por la verdigo de niaj ekonomioj;
kiu ebligas la kreadon de bonaj novaj laborpostenoj;
kiu celas socialan kaj generacian justecon kaj inkluzivan demokration;
kiu protektas siajn civitanojn kaj igas ilin memfidaj;
kiu amas diversecon kaj subtenas la regadon de la leĝo;
kiu subtenas internacian pacon kaj la Celojn de Daŭrigebla Evoluigo (17 SDG).

Ni ŝuldas tion al niaj infanoj kaj ni ŝuldas tion al la mondo.

Ni volas renovigi la promeson de Eŭropo. Ni defendas la eŭropan projekton. Ni laboros por kontraŭi kaj izoli tiujn, kiuj provos transformi pravan kritikon pri mankoj kaj eraroj en reiron al kontraŭ-eŭropismo, ekstremismo kaj ksenofobio. Ni neas al naciisma Eŭropo. Ni konsideras la unuigan proceson de Eŭropo kiel grandan historian atingon. Ĝi plurmaniere profitigas eŭropanojn. Sed ni ne ripozos sur niaj laŭroj. Eŭropo, nia komuna hejmo, estas dediĉo, respondeco.

Eŭropa unueco estu plu evoluigata en ĉiu generacio. Niatempe ĉiam pli gravas kunlabori por niaj komunaj valoroj kaj interesoj en la mondo. Por pritrakti la grandajn defiojn ni konsentu pri eŭropa suvereneco, ĉar niaj apartaj nacioj estas nesufiĉe potencaj. Ni pritraktu la defiojn kune kiel eŭropanoj. Eŭropo subtenu plurflankecon, homajn rajtojn, daŭrigeblan evoluigon kaj pacan konfliktoŝanĝadon.

Por konstrui Eŭropon, kiu utilas al siaj civitanoj, demokratio estu plifortigata. La EU-a institucia reto plu evoluu al plena multnivela demokratio, en kiu ĉiuj publikaj decidoj estas farataj laŭ trarivebla maniero de elektitaj kaj politike respondecaj reprezentantoj. Tiu reto ebligu al civitanoj aktive involviĝi por krei la transforman ŝanĝopovon en la bona direkto. Tial lobiado iĝu trarivebla kun devigaj reguloj. Pro ĉi ĉio ni defendas movadojn, kiuj antaŭenigas solidarecon, ekologian kaj klimatan respondecon, leĝoregadon, feminismon, justecon kaj liberecon. Tiuj estas kernaj verdulaj valoroj, kiujn ni sekvas strebante al popola demokratio. La Ekonomia kaj Mona Unio estu transformata por certigi, ke progreso estu juste kundividata kaj ke neniu estu postlasata.

Ni alvokas ĉiujn eŭropajn civitanojn uzi siajn rajtojn voĉdoni. Malofte okazis, ke eŭropa voĉdonado estis tiel grava, kiel estos la sekva. Ĉu Eŭropo kune antaŭeniros aŭ disfalos, dependas de la elekto de la civitanoj, de via elekto. Jen estas la 12 verdulaj prioritatoj por ŝanĝi Eŭropon:

Kontraŭi klimatsanĝiĝon, forigante karbon, antaŭenigante energian efikecon kaj transirante al 100%-a recikligo

Klimatsanĝiĝo estas la difina defio de nia epoko. Sen bridado de la klimatsanĝiĝo la homaro kreus gravegan katastrofon kaj igus multajn partojn de la mondo esence nelogebblaj.

Sed la respondo al la klimatkrizo ekzistas:

Ĝi komenciĝas per suna, venta kaj aliaj renovigeblaj energioj! Nia celo estu 100%-a recikligado, ni efike uzu nian energion, forigadu fosilian energion kaj atomenergion, samtempe kreante daŭrigeblajn laborpostenojn en koncernataj regionoj. Por sufiĉe rapide malpliigi la eligojn por atingi tutmonde la limon de 1,5-gradoj ni forte insistos por justa transiro al nete sen-eliga ekonomio. EU-vasta karbobuĝeto kaj forta baza prezo por CO₂ necesas por fortigi niajn penojn.

Ni pledas por forigado de karbo ĝis 2030 kaj de aliaj fosiliaj brulaĵoj baldaŭ poste. Fosiliaj kaj atomenergiaj subvencioj tuj ĉesu. Eŭropo bezonas liberigi sin de fosiliaj brulaĵoj kaj retiri privatajn kaj publikajn financojn el fosiliaj investadoj.

Investi en justa verda ekonomio, esplorado kaj navigado

Eŭropo havas ŝancon iĝi monda gvidanto en la justa transiro al klimato-neŭtrala cirkla ekonomio per Verdula Nova Interkonsento, venkante la rigidan kostoreduktan paradigmon kaj certigante ekonomian evoluon, kiu profitigos ĉiujn. Tio promesas bonan laboron kaj decajn postenojn, daŭrigeblon, socialan inkluzivecon, plibonigitan resistemon kontraŭ krizojn kaj stabilecon. Ni volas fari tion partnerece kun ekonomiaj agantoj, dungitoj, sindikatoj kaj firmaoj por antaŭenigi ekonomian sekurecon.

Ni alvokas al efika kaj sendependa EU-a aŭtoritato por superregi la ciferecan sektoron por regi kaj limigi la merkatan povon de grandaj kompanioj. Eŭropo bezonas komunan daŭrigeblan industri-politikon. Ni alvokas al verdigo de fabrikado kaj al verdigo de financado sed kontraŭas verd-lavadon. La evoluigo de taŭga infrastrukturo havu altan prioritaton; emfazo estu sur esplorado kaj ekologia renovigo.

La evoluigo de cifereca teknikaro kaj de pura teknikaro okazu kune kun direktado de sociaj bezonoj kaj de la Celoj al Daŭrigebla Evoluigo de la internacia komunumo. Al industria (de-)reguligado kaj komercaj interkonsentoj ne estu permesate subfosi aŭ kontraŭi ekologian kaj socialan progreson.

Garantii decan minimuman enspezon en membrolandoj

Eŭropo devas fariĝi vere sociala unio, sinpovigante laboristojn, batalante malriĉecon kaj reduktante malegalecon. La sociala promeso de justeco kaj inkluziveco por ĉiuj civitanoj devas esti renovigata; ĝi devas fariĝi nek viktimo de politikoj de elspezreduktoj nek de kompania avareco.

Ni batalas socialan dumpingon. Justa salajro, rajtoj de sindikatoj kaj decaj laborkondiĉoj devas esti sekurigataj. Eŭropa kadroleĝo observu, tra direktivo pri minimuma enspezo kiun decidis la sekvonta Eŭropa Parlamento, ke Membroŝtatoj garantiu al iliaj civitanoj decan minimumo-enspezon, respektante naciajn sistemojn de sociala asekuro.

Ni Verduloj ankaŭ batalas por justan pagadon dum malsanoj kaj gepatran paŭzon en ĉiuj landoj. Socialaj rajtoj fariĝu laŭleĝe observigeblaj. Ni rekomendas por naciaj eksperimentoj pri universala baza enspezo kaj eblecoj redukti la labortempon.

Sekurigi la regadon de juro kaj fundamentaj rajtoj, altigi travideblecon kaj batali korupcion

La regado de juro estas sub atakoj, kaj en Eŭropo kaj eksterlande. Ĝin defendi kontraŭ aŭtoritatismo estas batalo por la animo de Eŭropo. Eŭropaj Institucioj kaj Membroŝtatoj devas esti unuigataj en ĉi-tiu konflikto. La EU bezonas devigan kaj kompreneblan mekanismon rilate regulan monitoradon rilate la staton de demokratio, la jurŝtatecon, la rajton de opozicio esti aŭskultata, de liberaj amaskomunikiloj kaj fundamentaj rajtoj en ĉiuj EU-Membroŝtatoj. Ĝi bezonas ankaŭ sistemon de politika dialogo kaj rapida interveno, kaj subtenajn rimedojn por sendependaj amaskomunikiloj, por la civila socio kaj, necesokaze, por adekvataj sankcioj. Travidebleco de EU-institucioj estas nepre bezonata. Manko de travidebleco en la EU-Konsilio kompromitas demokratian respondecon kaj permesas hipokrite kulpigi 'Bruselon'. La EU devas videble subteni minoritatajn grupojn kontraŭ ajna diskriminacio. Necesas, ke ĝi protektadas aktivulojn, jurnalistojn kaj "fajfistojn", kiuj malkovras kaŝitajn informojn en la intereso de la publiko.

Eŭropaj fondusoj ne estu uzataj por rompi Eŭropajn principojn. Al naciaj registaroj, kiuj subfosas la regadon de juro estu rifuzata la kontrolo pri EU-fondusoj, aliflanke la subtenataj estu protektataj. Necesas rigore kontraŭbatali korupcion.

Defendi la rajton je azilo kaj establi laŭleĝajn kaj sekurajn kanalojn de migrado

Sekuraj garantioj por azilpetantoj ekzistas pro la lekcioj, kiujn la malluma historio de Eŭropo instruis al ni. Por ni la rajto je azilo ne estas intertraktebla. Ni volas azilpolitikon surbaze de solidareco, humaneco kaj ordokonformaj proceduroj, inkluzive de justaj dividoj de respondecoj inter la Membroŝtatoj, kaj reestablon de Eŭropa misio de savado sur la maro.

Eŭropo devas krei komunajn normojn kaj komunajn regulojn pri labormoviĝeco kaj migrado. Ni

deziras, ke la Unio subtenas naciojn kaj municipojn je la integrado de rifuĝintoj kaj migrantoj. Helpi migrantojn neniam estu krimigata. Homoj ne estu en prizono ĉar ili serĉas azilon.

Trajnoj estu realaj alternativoj al aviadiloj en Eŭropo

Unu el la kernaj celoj de la Verduloj estas transformi la transportsektoron tra Eŭropo por laŭeble rapide superi nian dependecon je poluciantaj veturiloj, ĉesigi la altiĝantan poluciadon kaŭze de aviadado kaj investi grandskale en regionajn kaj translimajn fervojoretojn. La CO₂-emisioj de la transportsektoro kontinuas altiĝi, aparte pro aŭtomobiloj kaj aviadiloj. Konekti naciojn kaj regionojn per rapidaj trajnoj, noktaj trajnoj kaj regionaj trajnoj estas pozitiva alternativo. Flugoj devas esti juste impostataj por egaligi la konkurencon inter trajn- kaj aviadil-transporto.

Protekti la sanon de niaj civitanoj per batalo kontraŭ aer- kaj akvopoluciado kaj haltigi plastorubiĝon

Determinita agado koncerne la vivmedion povas plibonigi la vivon de milionoj da homoj. Por protekti la aeron, kiun ni spiras kaj la akvon, kiun ni trinkas, ni devas rapide redukti poluciadon. Ĉiujare miloj mortas pro fajnpolvo kaj pro aliaj aeropoluciaĵoj. Signifa altigo de malsanoj estis provokita per degradado de la vivmedio kaj nesalubraj vivstiloj. Kemiaĵoj, hormonoj, nitratoj aŭ mikroplasto en nia nutraĵoĉeno prezentas multajn danĝerojn al nia sano. La EU devas aliri al la radikoj de ĉi problemoj kaj apliki taŭgajn rimedojn. Nerecikleblaj plasto estu impostataj aŭ malpermesataj, alternativoj estu evoluigataj kaj recikloceloj estu altigataj. Por konservi nian valoran naturon ni volas konsiderinde plivastigi protektitajn naturareojn, tiel ke ili konsistigas gravajn ekosistemojn. La EU bezonas novan naturmedian agadprogramon. La EU ne financu malutiladon al la vivmedio aŭ biodiverseco. Protektataj maroregionoj kovru 20%-ojn de niaj maroj.

Produkti surloke bonajn nutraĵojn sen genmanipulitaj organismoj kaj pesticidoj, farmado sen krueleco kontraŭ bestoj

Estonte la mono de la Eŭropa impostopaganto subtenos nur salubran nutraĵoproduktadon por Eŭropaj civitanoj anstataŭ subvencii la agroindustrion, kiu detruas niajn grundojn, altigas la krizon de biodiverseco kaj monopoligas la nutraĵoproduktadon.

La plej toksaj pesticidoj devas esti malpermesataj laŭeble plej rapide. Ni oponas, ke Eŭropaj agrikulturaj produktoj estas ŝutataj dumpinge sur la mondan merkaton kiuj detruas la lokan nutraĵoproduktadon en multaj evoluantaj landoj. Kiom multe terkulturistoj profitas de la agrikulturaj politikoj de EU dependu de tio, kiom konsekvence ili protektas la klimaton, sekurigas akvon, investas en bonfartado de bestoj, protektas biodiversecon kaj rezignas uzi genmanipulitajn organismojn.

Ni pli preferas justajn produkto-prezojn por kamparanoj en vitalaj ruraj regionoj ol servi al kelkaj multinaciaj konzernoj per gigantaj enspezoj. Verduloj esence pledas por la bonfarto de bestoj en farmado kontraste al la krueleco de amasbredado kaj la torturiga longdistanca transporto de brutaro.

Garantii liberan aliron al bonkvalita edukado, juste pagataj staĝoj kaj bonaj laborpostenoj por junuloj

Gejunuloj konstruas la estontecon de Eŭropo. Ni ŝuldas al ili la kiel eble plej bonajn kondiĉojn por fari tion kaj la rajton al emancipiĝo. Tial gejunuloj devas havi la rajton al malmultekosta altlerneja edukado, bonaj trejnado-kondiĉoj kaj justan aliron al bone pagitaj laborpostenoj. Sociala protekto por junuloj estu certigata per salajro super minimuma limo, kaj per eksperimentoj pri baza enspezo.

La EU instigu Membroŝtatojn investi pli en edukadon. Eŭropo devas investi multe por financi dumvivan lernadon kaj rekvalifikadon. La EU financoj por interŝanĝo-programoj, kiel la Erasmus-Programo, devas esti multobligataj dekoble. Ĉiu junulo devus havi la eblecon partopreni je interŝanĝo-programo senkonsidere de financa fono aŭ eduka kariero.

Sufiĉaj financoj por la Eŭropa Solidareco-Korpuso devus porti al gejunuloj la ŝancon evoluigi siajn proprajn volontulo-projektojn. Ni batalos kontraŭ dungomerkata regularo kiu malhelpas justan aliron por gejunuloj. Eŭropa Kulturo-Pasporto certe riĉigus la Erasmus-Programon.

Batali nun por imposto-justeco

Ĉiuj devas pagi sian justan partoprenon da impostoj ĉar imposto-fraŭdado kaj -evitado flanke de komercaj entreprenoj subfosas demokration. Niaj socioj estas fenditaj pli kaj pli. Maljusta impostado kontribuas al malegaleco. Kreskanta malegaleco, senbridaj lobiado kaj korupto prezentas grandajn danĝerojn por demokratio.

Ni Verduloj evoluigos imposto-reĝimojn kiuj ne pludaŭrigas privilegi grandajn transnaciajn kompaniojn kaj riĉajn individuojn. Ni forte batalis en la Eŭropa Parlamento por pli justa impostado.

Ni daŭre agados kontraŭ imposto-oazoj, imposto-fraŭdo, imposto-evito kaj monlavado.

Estas neakcepteble ke kelkaj transnaciaj kompanioj kaj ankaŭ grandaj interreto-platformoj pagas preskaŭ neniom da imposto. Sekve, ni volas enkonduki diĝitalan imposton en Eŭropo. Verduloj staras kontraŭ maljustan imposto-konkurencon inter Membroŝtatoj kiu rompas publikajn buĝetojn.

Batali por feminista Eŭropo, kontraŭ genrobazita perforto kaj por egalrajteco por ĉiuj

Genra egaleco estas ĉe la koro de politiko de la Verduloj. Ni volas ke la rajto al abortigo estu inkluzivita en la EU-Ĉarto de Fundamentaj Rajtoj. Ni volas certigi liberan kaj alireblan, bonkvalitan kaj sekuran zorgon pri seksa kaj reproduktiĝa sano kaj servojn por ĉiuj, kiu inkluzivas abortigon. Eŭropo devas batali kontraŭ seksobazitan perforton kiel prezentita en EU-politikoj pri preventado kaj batalo kontraŭ perforto al virinoj kaj enhejma perforto. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj devas enkonduki la Istanbulan Kontrakton kiel afero de prioritato. Ni nepre volas sekurigi egalan salajron por egala laboro kaj pli bone genro-balancitaj potenco-strukturoj. Ni ankaŭ deziras ke ĉiuj politikoj kaj servoj rekonas la veran diversecon de Eŭropanoj kaj pritraktas kaj malhelpas ĉiajn diskriminaciojn kaj perfortojn, inkluzive tiajn kontraŭ LGBTIK (Lesba, Geja, Bi, Trans, Interseksa, Kvera).

Haltigi armilo-eksportojn al diktatoroj kaj interbatalantaj partioj kaj subteni evoluon

La EU ankoraŭ estas paco projekto. Por konservi la pacon, Eŭropo bezonas komunan politikon pri sekureco kaj defendo, pere de kunlaborado kaj komuna uzado da rimedoj kaj ankaŭ kunordigante la eŭroponivelajn klopodojn de Membroŝtatoj.

Eŭropo ne serĉu profiton el senskrupula eksporto de armiloj kaj gvatteknikaroj al diktatoroj aŭ interbatalantoj. Ni devas postuli rigoraj eksporto-gvidlinioj. Ni ne garantiu stabilecon kaj evoluadon sole per armeaj rimedoj. Eŭropo pliigu siajn financajn rimedojn por kunlaboro pri evolado ĝis ili atingas almenaŭ 0.7% de la malneta enlanda produkto, kaj altigu siajn financojn por la preventado, solvado kaj moderado de civilaj konfliktoj, anstataŭ redukti ilin. Kiam homaj rajtoj kaj natura medio estas grave minacata, Eŭropo devas povi defendi siajn valorojn uzante siajn rimedojn amplekse pri eksterlanda politiko. Ampleksa koncepto de homa sekureco estos sukcesa sole enkadre de plurflankeco, de internacia justeco, de principo de la jurŝtato kaj de la protekto de homaj rajtoj.

Karaj voĉdonantoj,

la venonta elektado estos decida por la estonteco de Eŭropo. Ni volas superi la nunan staton kaj malfermi novan libron por nia komunaj eŭropaj klopodoj. La mondo ĉirkaŭ ni ne staras senmove kaj ni, en Eŭropo, ne rajtas malŝpari tempon. Ni kune faru la ŝanĝojn en Eŭropo! Ni kombinu radikalan analizon kun viziaj celoj kaj pragmata alproksimiĝo.

Eŭropaj Verduloj promesas batali por tiuj prioritatoj kiujn ni prezentas al vi ĉi-tie. Ni invitas ĉiujn Eŭropajn civitanojn subteni nin ĉi-cele. Elekti pli da Verduloj en la Eŭropan Parlamenton el pli da landoj helpas nin atingi tiujn celojn. Por atingi ĉi-tiujn prioritatojn, ni klopodos formi progresemajn aliancojn kaj plimulton en la sekvonta Eŭropa Parlamento. Verduloj promesas subteni elstaran kandidaton por la elektado al la eŭropa parlamento iĝi prezidanto de la sekvonta Eŭropa Komisiono kiu konsentas kun ĉi-tiuj prioritatoj. Ni konstruu pli bonan Eŭropon.